

ProCom'98

Sektion 3

„Terminologiewissenschaft und Plansprachen“

**Beiträge der Internationalen Konferenz
PROFESSIONAL COMMUNICATION
AND KNOWLEDGE TRANSFER
(Wien, 24 – 26 August 1998)
Infoterm * TermNet**

Redaktion: Detlev Blanke

**Berlin
2003**

Die GIL konzentriert ihre wissenschaftliche Arbeit vor allem auf Probleme der *internationalen sprachlichen Kommunikation*, der *Plansprachenwissenschaft* und der *Esperantologie*.

Die Gesellschaft gibt das Bulletin „Interlinguistische Informationen“ (ISSN 1430-2888) heraus und informiert darin über die international und in Deutschland wichtigsten interlinguistischen/esperantologischen Aktivitäten und Neuerscheinungen.

Im Rahmen ihrer Jahreshauptversammlungen führt sie Fachveranstaltungen zu interlinguistischen Problemen durch und veröffentlicht die Akten und andere Materialien.

Vorstand der GIL

- | | |
|------------------|---------------------------|
| 1. Vorsitzender: | Dr. sc. Detlev Blanke |
| 2. Vorsitzende: | Dr. habil. Sabine Fiedler |
| Schatzmeister: | Dipl.-Ing. Horst Jasmann |
| Mitglied: | Dr. Werner Bormann |
| Mitglied: | Prof. Dr. Ronald Löttsch |

Berlin 2003

Herausgegeben von der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)

Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin

Tel.: +49-30-54 12 633, Fax : +49-30-54 56 742

dblanke.gil@snafu.de

www.interlinguistik-gil.de

© bei den Autoren der Beiträge

ISSN: 1432-3567

ProCom'98

Sektion 3 „Terminologiewissenschaft und Plansprachen“

**Beiträge der Internationalen Konferenz
PROFESSIONAL COMMUNICATION
AND KNOWLEDGE TRANSFER
(Wien, 24 – 26 August 1998)
Infoterm * TermNet**

Redaktion: Detlev Blanke

**Berlin
2003**

Inhalt

<i>Detlev Blanke</i>	Vorbemerkung.....	7
	ProCom'98: Eine Konferenz für Eugen Wüster.....	9
	Eugen Wüster und die Interlinguistik – Auswahlbibliographie	14
	Terminology Science and Planned Languages	17

Beiträge der Sektion 3 „Terminologiewissenschaft und Plansprachen“

<i>Wera Blanke</i>	Probleme der Organisation terminologischer Aktivitäten in Esperanto....	45
<i>Otto Back</i>	Zur Esperanto-Wiedergabe lateinischer und griechischer Eigennamen in Wüsters Enzyklopädischem Wörterbuch	76
<i>Sabine Fiedler</i>	Eugen Wüster als Lexikograph: Rolle und Darstellungsweise von Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch	86
<i>Heinz Hoffmann</i>	Möglichkeiten einer Plansprache bei zwischensprachlichen Begriffsunterschieden am Beispiel von Eisenbahn-Termini	100
<i>Karl-Hermann Simon/ Ingward Ullrich</i>	Prinzipien des multilingualen Forstwörterbuches „Lexicon silvestre“ ...	110
<i>Wim M.A. de Smet</i>	Nomoj de plantoj kaj bestoj en Esperanto: La konceptoj de Wüster kompare kun tiuj de aliaj terminologoj	132
<i>Herbert Mayer</i>	Zum plansprachlichen Nachlaß von Eugen Wüster in der Österreichischen Nationalbibliothek.....	148
Autoren		154
Anhang:	ProCom'98 –Programm.....	155
Inhalt der Beihefte 1-10		158

Vorbemerkung

Die vorliegenden Akten sind aus mancherlei Sicht ungewöhnlich.

Es handelt sich um Texte zu Vorträgen, die auf einer Doppel-Konferenz gehalten wurden, die vor nunmehr fünf Jahren, vom 24.-28. August 1998, in Wien stattgefunden hat, anlässlich des 100. Geburtstags von Eugen Wüster (1898-1977), dem Begründer der Terminologiewissenschaft. Die Abkürzung ProCom steht für „**Professional Communication**“. Mit dieser Konferenz gekoppelt war das 4. Infoterm-Symposium zum Thema „Terminology Work and Knowledge Transfer“.

Da im Werk Wüsters die Plansprachen eine bedeutende Rolle spielen, waren auch interlinguistische Themen präsent.

Einige Interlinguisten, darunter auch Mitglieder der GIL, haben sich nicht nur an der Vorbereitung beteiligt, sondern auch zum Fachprogramm beigetragen. So wurden interlinguistische Themen in einem der einführenden Hauptvorträge und in sieben Vorträgen im Rahmen der *Sektion 3* „Terminologiewissenschaft und Plansprachen“ behandelt.

Ungewöhnlich und sehr zu kritisieren ist, daß diese Akten in Wien nicht, wie geplant, längst veröffentlicht wurden. Von den geplanten (und z.T. von den Tagungsteilnehmern bestellten und auch bezahlten) drei Bänden sind bisher nur die Bände I und II erschienen:

Oeser, Erhard / Galinski, Christian (1998): Eugen Wüster (1898-1977). Leben und Werk – Ein österreichischer Pionier der Informationsgesellschaft. His Life and Work – An Austrian Pioneer of the Information Society. (Proceedings of the International Conference on Professional Communication and Knowledge Transfer, Vienna, 24-26 August 1998), Volume I. Wien: International Information Centre for Terminology (Infoterm), 324 S.

Munteanu, Aranca (1998): 4th Infoterm Symposium. Terminology Work and Knowledge Transfer. Best Practice in Terminology Management and Terminography (Proceedings of the International Conference on Professional Communication and Knowledge Transfer, Vienna, 24-26 August 1998), Volume II. Wien: International Information Centre for Terminology (Infoterm), 456 S.

Der dritte Band, der u.a. die Beiträge der interlinguistischen Sektion enthalten müßte, steht aus. Es ist nicht abzusehen, wann er denn (und ob überhaupt noch) erscheinen wird.

Die GIL erhielt daher von Herrn Christian Galinski, Direktor von Infoterm¹, die freundliche Genehmigung, die Beiträge der *Sektion 3* zu veröffentlichen.

¹ Herr Galinski hat die Verzögerung nicht zu verantworten.

Damit das vorliegende Heft eine Vorstellung von der Konferenz vermitteln kann, insbesondere über ihre interlinguistische Komponente, wird auch der bereits veröffentlichte Plenarvortrag wieder abgedruckt, der dem plansprachlichen Werk Eugen Wüsters gewidmet ist. Er ist bereits im erwähnten Band I der Akten erschienen.

Die Beiträge sind Anfang 1998 entstanden und wurden bewußt nicht überarbeitet oder aktualisiert, damit sie den Charakter authentischer Akten behalten.

Immerhin kann die GIL somit eine Veröffentlichung zum 105. Geburtstag von Eugen Wüster vorlegen.

Berlin, im Novemer 2003

Detlev Blanke
(1. Vors. der GIL)

Nomoj de plantoj kaj bestoj en Esperanto: la konceptoj de Wüster kompare kun tiuj de aliaj terminologoj

- 1 Enkonduko**
- 2 La estiĝo de la unuaj nomoj de bestoj kaj plantoj en Esperanto**
- 3 Perdo de la kvalito de la nomoj en la sekvanta periodo**
- 4 La opinioj de Wüster**
- 5 La jardekoj post Wüster**
- 6 Kresko de la nomaro post 1970**
- 7 Menciinda iniciato: KNEB**
- 8 Spertoj de flaŭristoj**
- 9 Aliaj iniciatoj sur tiu kampo**
- 10 Konkludo**
- 11 Literaturo**

Abstract

Names of plants and animals in Esperanto: Wüster's approach in comparison to other terminologists

Eugen Wüster was surprised by the large number of Esperanto-names for animals and plants and the need to have many more of them. He formulated wise advice, e.g. not to transform the scientific names of the biological nomenclature to Esperanto-forms. In zoology such a transformation has been tried, but with a poor success; in botany a more popular form of transformation has been applied, but without reaching its goals. On the other hand popular names form a good field for expansion of this language. A completely different idea would be to start with a completely new form of scientific nomenclature, using the qualities of Esperanto and applying new concepts; New Biological Nomenclature (N.B.N.) is such a form.

Résumé concis

Eugen Wüster a été surpris par le grand nombre de noms en Espéranto pour dénommer les animaux et les plantes; et il a compris le besoin d'en ajouter. Il a formulé des sages conseils, p.ex. en déconseillant de transformer des noms scientifiques de la nomenclature biologique vers une version en Espéranto. En zoologie une telle transformation a déjà été essayée sans parvenir

à des résultats encourageants; en botanie une transformation bien plus populaire a été mise en route mais elle aboutit également. D'autre part les noms populaires peuvent avoir un bon succès dans l'expansion de cette langue. Quelque chose d'à part est l'idée de lancer une forme complètement nouvelle de nomenclature scientifique, tout en employant les qualités de l'Espéranto et en appliquant des autres conceptions; une telle idée est la Nomenclature Biologique Nouvelle (N.B.N.).

1 Enkonduko

Kiam *Eugen Wüster* (1898-1977) komencis la redaktan laboron de sia fama "Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana" (ĉirkaŭ la jaro 1920), li certe tuj konfuziĝis pro la jam granda nombro da nomoj de plantoj kaj bestoj en tiu relative nova lingvo. La temo interesis lin, kaj li tial pli profunde esploris ĝin, konsultante du biologojn, nome *d-ron Jentsch* kaj speciale *d-ron Walter Döhler*. El lia korespondado kun tiuj du personoj rezultis lia kompreno pri la komplikeco de tiu nomaro. Sekve de tio, li dediĉis al tiu temo 7 paĝojn (pp. 60-66) de la Enkonduka parto (aperinta en 1923) en la ĉapitro "Esperantologiaj Principoj".

Antaŭ kaj post Wüster pluraj aliaj personoj estas spertintaj similajn konstatojn, kaj multaj inter ili estas reagintaj al la faktoj per sia propra maniero, tiel kreante interesan, sed ankaŭ malbenindan faskon da ideoj, kiuj kondukis al diferencaj formoj de kreado de nomoj sur tiu kampo. Tiukampe multe dependas, ĉu tiuj nomkreantoj estis jes aŭ ne fascinitaj per la scienca nomenklature, kaj ĉu ili jes aŭ ne kapablis distingi inter la normalaj latinaj nomoj kaj la nomoj de tiu nomenklature.

Nun, je la fino de la 20a jarcento, en periodo kiam pluraj korifeoj de tiu nomformado estas forpasintaj, valoras iom retrorigardi al la jarcenta rezulto de tiu interesa fenomeno, kaj esplori kiel tiu nomfarado prefere evoluu en la sekvonta jarcento.

2 La estiĝo de la unuaj nomoj de bestoj kaj plantoj en Esperanto

La unuaj esperantlingvaj nomoj de bestoj kaj plantoj estas faritaj de la iniciatinto mem de la lingvo Esperanto, *d-ro L. Zamenhof* (1859-1917).

Profesie Zamenhof estis kuracisto kaj li do certe iam dum siaj universitataj studoj havis kursojn pri biologio, kiuj konatigis lin kun la scienca nomenklature de tiu fako. Sed pli speciale Zamenhof estis poliglota persono, kiu ankaŭ estis lerninta la latinan lingvon; kaj oni povas supozi ke li disponis pri

latina vortaro, en kiu li povis trovi la vere latinajn nomojn de tiuj bestoj kaj plantoj, pri kiuj li deziris kelkfoje paroli en siaj unuaj tekstoj en tiu de li iniciatita lingvo. Ni krome notu ke, eĉ pli ol por vortoj el aliaj kampoj, la vere latinaj nomoj de bestoj kaj plantoj estas lasintaj siajn spurojn en multaj romanidaj lingvoj kaj ili do retroviĝas en la lingvoj, el kiuj Zamenhof prefere ĉerpis la vortojn por la lingvo, kiun li daŭre ellaboris (ĉefe la franca).

Se oni konsultas la "Universalan Vortaron", kiu apartenas al la Zamenhof-a verko "Fundamento de Esperanto" (1905), oni trovas inter la 2641 "fundamentaj vortoj" 182 nomojn de bestoj kaj 135 de plantoj. Necesas ĉi tie kompreni ke, kiel en multaj aliaj lingvoj, por multaj plantoj ofte ekzistas la sama nomo (aŭ parto de ĝi aŭ inverse) por la frukto (nukso, bero aŭ greno) aŭ por la ligno, kiel por la tuta planto; fakte 66 nomoj de tiu dua grupo rilatas ne rekte al la planto mem, sed ili lasas supozi kiel oni povus nomi tiun vegetaĵon.

Inter la nomoj de bestoj, du temas pri rasoj de hundoj (pudelo, mopso), unu pri bred-produkto (mulo) kaj unu pri formortinta taksono (uro); ankaŭ la specio "homo" estas kalkulita de ni en tiu ĉi listo, kiel tion faras la biologoj; ankaŭ la legenda besto "drako". Kelkaj nomoj kovras tutan hierarĥian ŝtupon: birdo, fiŝo, amfibio, fungo. Tre malmultaj estas la kunmetitaj vortoj: "molanaso", "norda cervo" kaj "sonserpento" inter la bestoj, "akvomelono" kaj "terpomo" inter la plantoj. - Se oni serĉas la originon de tiuj nomoj, oni konstatas ke multegaj inter ili estas derivitaj el la latina nomo (kelkaj eĉ ne bezonis iun ajn ŝangon: bufo, homo...) aŭ el romanida lingvo, ĉefe la franca; eĉ por multaj nomoj oni ne povus decidi ĉu klasifi ilin inter la latindevenaj aŭ inter franc- aŭ italdevenaj. Kelkaj nelatinaj nomoj de bestoj fakte povus esti konceptataj vere pli francaj (aglo, ajlo...), aliaj fakte novfrancaj sed originantaj el germanaj aŭ slavaj vortoj: hamstro, zizelo. Ankaŭ estas kelkaj bestonomoj kiuj ne ekzistas en la klasika latina, kaj kiuj supozeble venas el la scienca nomenklaturaro (kie ili estas speciale kreitaj): petromizo (greka kunmetaĵo; nun prefere estu uzata "lampetro", derivaĵo el la latina), didelfo (ankaŭ greka, sed jam transprenita en la polan kaj iusence en la franca) kaj miogalo (ĉi-lastaj cetere estante konfuza kazo kiel ni vidos poste); kaj krome la pli ĝeneralaj nomoj "insekto" kaj "amfibio" (formitaj siatempe el latinaj kaj grekaj vortoj).

Ĉe la plantoj, ĉefe ĉe la ĝardenfloroj, estas pli da tiaj iom fremdaj nomoj, kiuj ne necese venas el la scienca nomenklaturaro, sed multe pli el la terminoj per kiuj tiuj floroj populariĝis en Eŭropo, en periodo kiam oni kreis nomojn surbaze de grekaj aŭ latinaj vortoj.

Nur tre malmultaj nomoj havas alian originon. Specialaj ekzemploj ĉe la bestoj estas: hundo, ŝafo (germanaj), ŝarko (angla), mevo (nederlanda?), najtingalo (hibrido de germana kaj angla), alciono (malnovgreka) kaj la iom aparta "omaro" (fakte itala); ĉe la plantoj oni povas referi al: kreno

(rusa), levkojo (germana kaj pola). Aparta kazo estas "lekanto", tre kripligita formo de greka nomo. Vera kombinaĵo de pluraj lingvoj estas "sturgo" kaj iumaniere "sterledo".

Kvankam oni povas renkonti iun sistemecan metodon en la derivado de tiuj nomoj el la latina aŭ el aliaj lingvoj, la flankeniĝoj estas tamen multnombraj. Sed ne utilas priparoli tion ĉi tie, des pli ĉar pri tio okupas sin la tre interesa serio "Etimologia vortaro" de *Ebbe Vilborg*, kiu en tiuj ĉi jaroj aperas.

Pli multe ol la etimologio de la nomoj interesu nin la identeco de la koncernaj bestoj kaj plantoj. Tiun identecon oni principe devus povi konkludi el la akompane cititaj nomoj en kvin aliaj lingvoj (franca, angla, germana, rusa, pola). Por multaj el la nomoj tiu identeco ne lasas dubon. Restas tamen pluraj pri kiuj ŝvebas necertecoj. "Silvio" kreas jam dubojn, des pli, ĉar la angla nomo indikas ion alian. Tiajn dubojn ankaŭ povus havigi "pasero", kiu en la franca lingvo estas indikata ne kiel "moineau" sed kiel "passereau" (kio signifas: "kanto-birdo"). Ĝenaj estas la distingo inter "perko" kaj "perĉo" (sufiĉe similaj fiŝoj), "pino" kaj "pinio" (ambaŭ koniferoj), "tetro" kaj "tetrao" (ambaŭ Eŭropaj ĉasbirdoj), kaj vere konfuzigaj pro la originaj signifoj kaj iliaj tradukaĵoj estas "fringo" kaj "fringelo" (ambaŭ kantobirdoj). Simile efikas konfuzige "sardelo" (indikita en la franca per "sardine") kaj la poste aperinta "sardino". Ni ankaŭ konsciu ke "pantero" kaj "leopardo" rilatas al la sama specio, kiu en tre multaj lingvoj estas konata per du diversaj nomoj; oni povas demandi sin, ĉu Zamenhof jes aŭ ne kredis pri iu diferenco. La plej konfuziga nomo tamen restas "miogalo" (el la por sciencaj celoj kreita vorto "Myogale"), kiu laŭ iuj respondaj nomoj en aliaj lingvoj, jen estus iu ronĝulo ("rato"), jen iu soriko, - nomo kiu jam kondukis al pluraj miskomprenoj (vidu De Smet, 1987a).

Ne devas mirigi, ke la nomaro de tiuj plantoj kaj bestoj en tiu "Universala Vortaro" referas grandparte al specioj kiuj vivas aŭ kultiviĝas en centra Eŭropo aŭ estas tie konataj kiel nutraĵo aŭ peltaĵo aŭ ĝardenaĵo. Eĉ specioj kiuj apenaŭ estas konataj en aliaj partoj de Eŭropo (tetro kaj tetrao; perĉo; sterledo...) aŭ kiuj ne plu ekzistas sed longe travivis en la pola arbaro (uro) troviĝas en tiu listo, dum aliflanke mankas multaj specioj de komuna uzo en aliaj mondpartoj.

3 Perdo de la kvalito de la nomoj en la sekvanta periodo

Per tiuj supre cititaj ekzemploj Zamenhof estis indikinta kiel oni prefere procedu por krei esperantlingvaj nomojn: prefere el la latina (sed la vera latina, ne la misbakaĵoj de la lastaj jarcentoj kiel tiaj ofte troviĝas en la scienca nomenklatur), kaj, se pri tio povus ekzisti nekonvenaĵoj, el iuj aliaj lingvoj, prefere se renkontataj en pluraj lingvoj per simila radiko.

Post tiuj pozitivaj konstatoj estas des pli mirinde ke en postaj verkoj (ekz. vortaroj aperintaj sub la respondeco de Zamenhof), aperas sufiĉe multaj nomoj, kiuj estas vere inspiritaj de la scienca nomenklature, kvankam ankaŭ pli simpla nomo povus ekzisti por tia indiko (kaj efektive poste aperis ĉe aliaj verkantoj). Pri tio atestas la "Zamenhof-radikaro" kiun *Kirschke* redaktis por *Wüster* (1927). En tiu libro (kaj la koncernaj nomoj fakte limiĝas al ĝia unua parto, la tiel nomita "Zamenhof-a parto") oni ja trovas 46 pliajn nomojn de bestoj kaj 40 pliajn de plantoj. Inter la bestoj estas unu legenda (leviatano), du hundorasoj (buldogo, vertrago) kaj unu laŭ du diversaj skribmanieroj (ĥameleono, kameleono); inter la plantoj kvar klare referas al frukto aŭ alia produkto (batato, bergamoto, marono, spelo).

Sekve de la de Zamenhof kontrolitaj vortaroj de *Jürgensen* (Esperanto-germana kaj germana-Esperanto) estas aperintaj kelkaj vere malkonvenaj nomoj de greka kunmeto: fenikoptero (flamingo), makrocefalo (kaĉaloto), makropo (kangurao), mirmekofago (formik-urso), perknoptero (iu grifo), - se nur citante la bestonomojn. Jen bedaŭrinda signo de flankeniĝo sub influo de fasciniĝo per tiu nomenklature, pri kiu oni kredas ke ĝi estas latina, sed kiu fakte estas kreaĵo de sciencistoj. - Feliĉe ankaŭ estas pluraj nomoj de normala origino; inter ili ankaŭ unu kunmetita nomo: cibetkato.

Krome en tiu periodo pliaj nomoj estas aldonitaj fare de aliaj personoj, ekster la kontrolo de *Zamenhof*. *Wüster* citas (p. 65) tri el tiuj nomkreintoj: *Bein*, *Boirac*, *Millidge*, sed certe estas pli da ili. Ni notu cetere, ke en la periodo inter 1908 kaj 1914 aperis ne malpli ol 14 nacilingvaj vortaroj, kaj ĉiu inter ili enhavis, laŭ propra elekto aŭ kreemo, aron da nomoj de bestoj kaj plantoj.

Interese estas konstati ke jam en 1911 estas ellaborita iu provo de esperantlingva nomaro (216 pp.) de ĉiuj Eŭropaj birdoj kun citado de iliaj nomoj en kelkaj aliaj lingvoj fare de *Petro Stojan*. El nenio montriĝas, ke *Stojan* mem estis aparte sperta pri birdoj (sed li dum kelkaj jaroj estis instruisto de sciencoj), sed li certe vidis en tiu nomaro ion, per kio li povus montri la utilon de la nova lingvo. Liaj nomoj ĝenerale estas bone faritaj, sen la bombasto de la scienca nomenklature. Bedaŭrinde lia valora verko poste estas grandparte forgesita.

Male al la aprezinda verko de *Stojan*, en Francio aperis tekstoj de la fotografo *Charles Vêrax*, kiu sentis sin komplete fascinita per la scienca nomenklature kaj kiu naive kredis, ke per tiu oni povus krei abundon da esperantlingvaj nomoj de plantoj kaj bestoj. En kunlaboro kun iu *Givry* (ĉu eble biologo?) li publikigis en 1908 en la tiama "Internacia Scienca Revuo" du tekstojn (fakte korespondanĵojn) per kiuj li eksplikis sian metodon. Tiuj du tekstoj estas ekzemploj de mizera diletantismo, ĉar la du verkintoj ŝajne ne komprenis la zoologian kaj botanikan nomenklaturon (ili eĉ

uzis la tekstojn de *A. de Candolle* el 1867, kvankam en tiu periodo pretiĝis la novaj universalaj kodoj de tiuj nomenklaturetoj) kaj supozeble ili ankaŭ ne sciis la latinan. Kiel ajn, ili estas enkondukintaj per la de ili cititaj ekzemploj plurajn novajn nomojn kiuj poste konserviĝis (ekz. "kanabeno", derivaĵo de la adjektivo "cannabina"). Eble iliaj proponoj ne havis grandan eĥon, sed ili tamen ne povis esti pretervidataj de la pli kleraj homoj de la postaj jardekoj, kiel tion pruvas la konstatoj de *Wüster*.

4 La opinioj de *Wüster*

Post la Unua Mondmilito aperis novaj personoj sur la scenejo, i.a. *Eugen Wüster*. En la preparado de sia "Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana" (en la jaroj antaŭ kaj post 1920) tiu kompetenta persono klare konsciis pri la problemoj, kiuj estas ligitaj al tiuj nomoj de plantoj kaj bestoj, des pli ĉar li volis en sia verko kompletigi la nomaron ĝis pli larĝa uzebleco.

En la ĉapitro "Pri la nomoj de bestoj kaj plantoj" (pp. 60-66 de la unua kajero) li prilumas tiujn problemojn, uzante sinoptikan tabelon kaj eksplikante siajn konsiderojn kaj labormetodojn per iu (ne facile komprenebla ĉar komplika) teksto. Li distingas inter "komun-lingvaj unuoj", "biologiaj unuoj" kaj "sistematikaj unuoj" (la tria estas por li la "bionologiaj unuoj"). Por la du unuaj li subtenas ke la fontoj de la esperantlingvaj nomoj devas esti la naciaj lingvoj (inter kiujn li kalkulas la klasikan latinan lingvon). Por la tria li malkonsilas uzi Esperanton.

Kelkaj el la de li tiusence esprimitaj ideoj meritas iun specialan atenton. Ni citu kelkajn: "Inter la nomoj de komunlingvaj (kaj biologiaj) unuoj unuflanke kaj inter la nomoj de la sistematikaj unuoj aliflanke ekzistas profunda diferenco" (p. 62); "Almenaŭ por la proksimaj jardekoj do ne ekzistas konsiderinda bezono, transporti la bionologian sistemon en Esperanton. Se tion fakte oni volus entrepreni, oni ankaŭ renkontus gravajn malhelpojn. Ĉiuj, kiuj pledis por tio, konsentis, ke oni devus fidele imiti la latinan nomenklaturon. Sed tio signifus ankaŭ ke..." (p. 62); "Post tia pripenso oni eliminis la ekziston de kompleta bionologia vortaro EL kaj LE el rezonoj, kiuj volas resti sur la fundamento de la faktoj." (p. 63); "Jam la nomado de ĉiuj genroj per apartaj radikoj, kia estas kutimo en la scienc-latina nomenklatureto, devis esti karakterizata kiel neakordigebla kun la postuloj de la lingvekonomio." (pp. 64-65). Li konsile aldonas: "Cetere ankaŭ preskaŭ ĉiuj vortaristoj de la naciaj lingvoj fariĝis viktimoj de la sama intermikso inter la antikva latino kaj la scienca latina nomenklatureto." (p. 65).

La klarvidaj ideoj, kiujn *Wüster* tiam esprimis, en postaj jardekoj bedaŭrinde estas preteratentitaj, intence aŭ neintence, de pluraj personoj kiuj, fascinitaj per la scienca nomenklatureto

de kelkaj vortoj, kredis povi kontribui al la riĉigo de la Esperanto-vortaro per imitaĵoj de tiu scienca nomenklature, pri kies malstabileco kaj malracieco ili ne konsciis. Kaj tiu stato daŭras ĝis nun. Pruvo estas, ke la Terminologia Centro de Universala Esperanto-Asocio en 1995 eldonis, sub la daŭra insistado de unu persono, broŝuron por ekspliki en plej serioza maniero kiel oni devus fari tiajn ĉarlatanaĵojn.

5 La jardekoj post Wüster

La periodo inter la du mondmilitoj, kaj eĉ la tuta periodo ĝis 1970, ne multe kontribuis al la kreado de pliaj nomoj, se oni ne atentis pri la nekohera enkondukado de novaj nomoj en kelkaj vortaroj kaj en la malmultaj tekstoj, kiuj tiam aperis pri bestoj kaj plantoj. Kelkaj nomaroj ja estas redaktitaj, sed ili ofte restis sub formo de manuskriptoj sen iam aperi. En tiuj jaroj la Esperanto-afero multe pli interesiĝis pri aliaj taskoj kaj ĝi cetere atendis la aperon de la "Plena Ilustrita Vortaro" (Waringhien 1970), antaŭvidita por 1955 sed realigita nur en 1970.

El la malmultaj valoraj verkoj el tiu periodo necesas citi tiujn de *Paul Neergaard* (ekz. la populara "La vivo de la plantoj" kaj la vere riĉenhava "Ataĵoj kontraŭ ĝardenplantoj"); tiu ĉi dana plantpatologiisto konsekvence sekvis la metodon de Zamenhof kaj de Wüster, prefere kreante nomojn el naciaj lingvoj, kaj nur por kelkaj kazoj inspirante sin je nomoj de la scienca nomenklature, sed neniel transigante la tutan nomon al esperanto-formo.

Kontraste al tiu saĝa metodo de *Neergaard*, la norvega zoologo *Carl Stop-Bowitz*, fascinita per la scienca nomenklature, en siaj tekstoj (prelegoj, kursotekstoj k.a.) neniel hezitis transvesti la nomojn laŭ iu de li mem konceptita sistemo (antaŭaĵo de la teksto de la Terminologia Esperanto-Centro). Ke lia metodo ne ĉiam estis aprezata, montras la kondamna frazo de la Nederlanda biologo *G.F.Makkink* (1975): "Esperanto ne estu ĝenata de la monstraĵoj de la scienca nomenklature, nek de ĝia ŝanĝiĝeco" (temas i.a. pri la transigo de la nomo *Homo sapiens* al "Homo saĝa", abomena mistradukaĵo).

Aparte citinda estas la en 1961 aperinta "Bild-libro pri bestoj", ĉefe infanlibro, traduko (fare de *W. Getting* kun helpo de aliaj) de populara angla libro. Malgraŭ la grandaj meritoj de tiu bone ilustrita libro, kiu certe en sia originala versio estas laŭdinda, la amatorisme farita traduko de kelkaj centoj da bestonomoj (inspire de la angla nomo) neniel kontribuis al la pliriĉigo de la Esperanto-vortaro, eĉ male. Nomoj kiel "arĝenta laro" (anstataŭ "arĝent-mevo") aŭ "ora orioleto" vere ne estas bonaj ekzemploj pri la informa signifo de iu nomo.

La longe atendida "Plena Ilustrita Vortaro" (sub la redakto de *Gaston Waringhien*) en 1970 kaŭzis, krom multaj laŭdoj, ankaŭ multajn malkontentojn (vidu ekzemple la rimarkojn de Halvelik 1976). La nomoj de la plantoj, kolektitaj de *Paul Neergaard*, estas en forta kvalitkontrasto kun tiuj de la bestoj, kolektitaj de *Carl Stop-Bowitz* (vidu la recenzon de De Smet, 1970). Inter la bestonomoj svarmas nenecesaj vortoj kiel: falakrokorako (kormorano), ĥaradrio (pluvio), sfenisko (pingveno), ornitorinko (platipo), prokavio (hirako)... pro la deziro resti fidela al nomoj de la scienca nomenklatureto. En la Enkonduka parto ambaŭ verkintoj, unu sendepende de la alia, eksplikas sian metodon kaj ili per tio jam montras, ke ĉiu el la du suriris diversan vojon, kiel estas jam citite ĉi-supre. Oni povus simplige diri, ke *Neergaard* apartenas al la Wüster-skolo, dum *Stop-Bowitz* neas tiun skolon kaj preferas daŭrigi la amatorismaĵojn de *Givry* kaj *Vérax*.

Neeviteble tiu stato havos siajn sekvojn en la postaj jaroj.

6 Kresko de la nomaro post 1970

Sur la kampo de la nomoj, la periodo post 1970 ŝajnas esti pli interesa ol la 40 antaŭaj jaroj. Ĉiukaze ne mankis en la nova periodo la iniciatoj kaj la diskutoj, unuflanke sekve de la ekzisto de la "Plena Ilustrita Vortaro", aliflanke pro la agado de kelkaj organizaĵoj kaj revuoj, - sed ankaŭ pro iu tute aparta iniciato, kiu suriras komplete aliajn vojojn, nome Nova Biologia Nomenklatureto (N.B.N.).

Por kompreni pli bone tiun apartan iniciaton, jen kelkaj informoj. La konstatoj (fare de multaj biologoj) pri la malkontentiga stato de la tradiciaj sciencaj nomenklaturetoj de zoologio kaj de botaniko (klare evidentigita per la ĉiam ŝanĝiĝantaj kodoj kaj per la nunaj provoj kunfandi la du kodojn; kaj plej bone ilustrita per la malkontento de la bakteriologoj kiuj nun formas sian propran nomenklatureton) kondukis al la ideo, ke la sciencistaro prefere iam havu iun tute novan biologian nomenklatureton, kiu ne suferus sub la balasto de la tradicioj. Por ke tia nova nomenklatureto estu klare distingebla de la tradiciaj, ĝi havu proprajn distingilojn, ĝi apliku aliajn metodojn, kaj ĝi nepre uzu alian lingvon. Montriĝis ke la lingvo Esperanto kun siaj konstantaj finaĵoj de la vortoj aparte bone taŭgas por tia nova nomsistemo. Tiel estiĝis la ideo (jam komunikita en 1959 kaj 1963) ellabori por la sciencistaro novan nomenklaturesistemon kaj uzi Esperanton por ĝi. La ellaboritaj reguloj de tiu sistemo estis komunikitaj en 1971 (redaktitaj en 1969) en "Scienca Revuo" kaj ili estis ilustrataj per ekzemploj de nomoj de (ĉefe) la specioj de la Cetacoj (delfenoj, balenoj, ...).

La apero de tiu teksto kaŭzis la estigon de diskutoj pri kaj la novaj kaj la tradiciaj formoj de nomenklatureto, ankaŭ en Esperanto-medioj. Plej atentinda estis la reago de la supre menciita *Stop-*

Bowitz, kiu jen kaptis la okazon (1971) por prilumi la de li preferitan sistemon de transigo de sciencaj nomoj al esperanto-formo kaj ekspliki ĝin nun pli detale, ankaŭ kun ekzemploj, paralelaj al la NBN-modeloj, kiuj estis prezentitaj en la antaŭa teksto. Kvankam multaj el tiuj ekzemploj de *Stop-Bowitz* levis multajn brovojn pro miro, kaj kelkfoje estas cititaj kiel ekzemploj de neakcepteblaj nomoj (i.a. dum AIS-kursoj en San Marino), la starpunktoj de ambaŭ flankoj restis la samaj dum la postaj jardekoj: unuflanke troviĝas Nova Biologia Nomenklature, kiu restis ekzisti, akiris multajn simpatiantojn (la subtena asocio daŭre kreskas ĝis jam 370 membroj, inter kiuj kelkaj gravaj biologoj, ankaŭ de ekster la Esperanto-afero), la sistemo estas daŭre kompletigita, jam preskaŭ 3000 NBN-nomoj estas oficialigitaj, pli ol dekkvin libroj estas eldonitaj, en sciencaj kongresoj oni jam parolis pri ĝi, k.t.p.; aliflanke troviĝis *Stop-Bowitz* (1909-1997), kiu restis ĉe sia vidpunkto, provis konvinki en Esperanto-medioj pri la taŭgeco de sia sistemo (kvankam agnoskante ke *Wüster* siatempe malrekomendis ion tian) kaj povis konsistigi komisionon de dek-unu personoj (inter kiuj tamen nur tri biologoj) kiu, per komisiono de la Terminologia Esperanto-Centro, publikigis tekston (1995), kiu konfirmas la metodon de *Stop-Bowitz*. - Pro la forpaso de ĉi-lasto (en 1997) estas nun malfacile antaŭvidi kiel plue evoluos tiu afero. Oni nur konstati ke tiu komisiono fakte entombigis la saĝajn konsilojn, kiujn *Wüster* estis espriminta siatempe.

Alia sekvo de la estiĝo de Nova Biologia Nomenklature kaj de la ĝin subtenanta asocio, estas ke nun ekzistas adreso al kiu homoj direktas sin kun proponoj pri nomoj aŭ pri nommetodoj, kaj ke danke al tio oni nun povas akiri pli klaran bildon pri la diversaj iniciatoj kiuj jen kaj jen aperas sur tiu kampo, ĉu nur en la mensoj, ĉu sub formo de manuskriptoj, ĉu sub formo de publikigitaj tekstoj (vidu poste).

7 Menciinda iniciato: KNEB

Aparte menciinda iniciato el tiu periodo post 1970 estas tiu de la siatempe ekzistanta "Ornitologia Rondo Esperantlingva" (ORE), nome la redakto de "Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj" (KNEB) (1971). Tiu nomaro rezultis el la bezonoj de la membroj de tiu en 1961 starigita rondo por havi iun unuecan nomaron por la publikigoj en sia revuo "La Mevo". Montriĝis ke la nomaro de *Stojan* (vidu supre) estis kvazaŭ komplete forgesita (kaj tre malfacile trovebla) kaj ke pluraj homoj jam estis farintaj listojn de la nomoj de la birdoj de sia lando, ĝenerale tradukanta la enlandan nomon al iu esperanto-versio. Tiel jam ekzistis listoj redaktitaj de *B. Gerdman* (svedo), *L.K. Hunnes* (norvego), *A. Liszy* (hungaro), *G.F. Makkink* (nederlandano), *K. Twinn* (anglo), sed inter ili nur unu eldonita en revuo (tiu de Makkink) dum kelkaj aliaj estis en polikopiita formo aŭ restis kiel

manuskripto. El tiuj listoj montriĝis granda malunueco. Tiel la birdo nomita science *Coccothraustes coccothraustes* jen estis citita kiel "kokotraŭsto", jen "kernmordulo", jen "kernrompulo", jen "dikbekulo", jen "pomfringo". Vere necesis unueco.

En la sino de ORE formiĝis Nomenklatura Komisiono, en kiu 11 personoj deziris havi sian kontribuon. Kvarpersona kerno plurfoje kunsidis en 1968 (en Eindhoven, Nederlando) kaj provis decidi pri la preferotaj nomoj. La provoj ne ĉiam estis sukcesaj pro manko de klaraj kriterioj, kaj ili grave suferis kiam envenis la proponoj de la membro *Støp-Bowitz*, kiu intervenis per tute aliaj nomoj, aldonante krome al la listo tiujn faritajn laŭ lia transigsisistemo. Ni citu trafan ekzemplon, tiu de la orienteŭropa-nordafrika specio de gruoj, kiu estas fama pro sia koketeca konduto kaj kiu tial en multaj lingvoj estas komparata kun junulino ("Jungfernkranich" en la germana, "demoiselle crane" en la angla), kaj kies scienca nomo nun estas *Anthropoides virgo* (la latina vorto "virgo" unualoke signifas "junulino", sed poste en multaj medioj akiris la signifon "nekoitinta junulino"); dum la aliaj membroj jam estis interkonsentintaj pri "fraŭlingruo", laŭ la propono de S.-B. la specio nomiĝu "virgulina gruo" kaj ĝia adaptita scienca nomo estus "Antropojdo virga".

Pro la daŭraj malfacilaĵoj, la gvidanto de la komisiono, *R. Bossong*, fine decidis fari la findecidojn sola. Li submetis en 1971 sian finan version al la eldononto ("Esperanto Press" en Kanado). Tiu fina versio, kvankam grandparte kontentiganta, tamen enhavas kelkajn bedaŭrindajn nekonvenaĵojn, kiuj kontraŭas kelkajn ĝenerale akceptitajn nomojn. La plej ĝena temas pri unu el la plej malgrandaj birdoj de Eŭropo, tiu kiu en la scienca nomenklaturado akiris la stultan nomon *Troglodytes troglodytes*. En la vera latina lingvo tiu birdeto estis konata per la nomo "parvulus"; senprobleme tiu nomo jam estis transigita al la esperanto-formo "parvolo" (kaj tiel ĝi cetere aperis en la "Bild-libro pri bestoj"). Kvankam la kunsidintoj estis konsentintaj preni tiun nomon, la influo de *Støp-Bowitz* kaŭzis, ke la KNEB citas por ĝi la nomon "troglodito", eĉ malgraŭ la ĝenerale konata alia signifo de tiu vorto.

Spite al la espero ke danke al tiu nomaro (kiu cetere nur havas utilon por eŭropanoj) oni de nun uzus nur tiujn nomojn en la revuo "La Mevo" kaj ke novaj provoj ne plu estus necesaj, tro da homoj daŭrigis krei nomojn laŭ sia bontrovo (kaj la sinsekvaj redaktoroj eĉ senprobleme lasis aperi tiujn nomojn). Kaj denove aperis nomaroj, ekz. tiuj de *Béla Mészáros*, de *Löfgren* kaj de *Jorritsma*. Aparte menciinda estas provo (sed neniam publikigita) de *R. Chandler* pri aŭstraliaj birdoj; ankaŭ ekzistas mallonga listo (publikigita en revuo) de kelkaj Novzelandaj birdoj (kaj insektoj, plantoj kaj aliaj) fare de *F. Tucker*.

Kiel ajn, tiu KNEB montris sian utilon kaj ĝi ofte estis laŭdata. Eĉ pli ol du jardekojn poste ĝi akiris laŭdojn de *Judith Jackson* okaze de simpozio de la Akademio de Esperanto (1995), des pli ĉar, laŭ ŝiaj spertoj, tiu nomaro ebligas instrui pri birdoj sen uzi komplikajn nomojn.

8 Spertoj de flaŭristoj

Simile kiel la eŭropaj esperantemaj birdobservantoj, ankaŭ la mezeŭropaj esperantemaj plantŝatantoj sentis la bezonon iam povi disponi pri nomoj de la plantoj kiujn ili renkontas dum siaj komunaj migradoj. Dum 12 renkontiĝoj por pristudi la flaŭron de iu regiono (ĉefe en Svislando kaj Germanio), ili disponigis parton de sia tempo por redakti tiajn nomarojn.

Male al la populara ornitologio, kiu disponas pri etnolingvaj nomoj por ĉiuj birdoj de la koncerna lando, en la grandega kvanto da specioj de plantoj multaj specioj ne havas etno-lingvan nomon, kun la rezulto ke en medioj de plantkolektantoj la scienca nomo (erare nomita: latina nomo) pli ofte estas uzata. Jam de la komenco de ilia terminologia laboro la scienca nomo tre multe influis, kaj tiu influo kreskis kiam pli da profesiaj botanikistoj envenis en la rondon. Sekve de tiu situacio tiuj, kiuj emis havi simplan, vere esperanto-forman, nomaron kiel tiun de la KNEB, devis cedi al tiuj kiuj, nesciante aŭ ignorante la konsilojn de *Wüster*, preferis iun esperantlingvan kopion de la scienca nomaro.

Dum la jaroj tamen pruviĝis tio, kion oni povus antaŭvidi (kaj pri kio oni cetere avertis), nome ke ili venus en sakstraton. Ĉiujare estis ŝanĝoj en la metodo, kun la rezulto ke aperis unu versio post la alia (la 9a en 1996), io kio ne povis plaĉi al la presisto (*Rüdiger Eichholz*), kiu emis enmeti la tekstojn en siajn publikigaĵojn. Admirindaj estis la persisto de la homoj (ĉefe ilia gvidanto, pastro *Eichkorn*) kaj la kvanto da bele preparitaj listoj kaj tekstoj kiuj rezultis el ilia laboro. Sed la en 1995 aperintaj rekomendoj, iniciatitaj de *Stop-Bowitz* kaj lia komisiono kaj eldonitaj de la Terminologia Esperanto-Centro, fakte ignoris tiujn provojn kaj necesigus rekomenci parton de la laboro. En 1997 la tuta afero kolapsis post la retiriĝo de la gvidanto de la komisiono. Jen plian fojon la saĝaj ideoj de *Wüster* estis pravigitaj.

9 Aliaj iniciatoj sur tiu kampo

Kiel supre dirite, regule envenas ĉe la verkinto de tiu ĉi teksto leteroj kun proponoj pri nomoj aŭ pri metodoj, eĉ pri tutaj nomarsistemoj. Tiel li povas havi iun superrigardon pri tio.

Fakto estas ke inter la adeptoj de la lingvo Esperanto ekzistas sufiĉe multaj homoj kun kreema menso, kaj ke oni do ne devas miri, ke kelkaj inter tiuj homoj pripensas eblaĵojn por krei nomojn aŭ tutajn nomarojn, ĉu por ordinara uzo, ĉu por supozitaj sciencaj celoj. Tia konstato neniel enhavas negativan signifon, ĉar, verdire, ankaŭ *Wiŭster*, ankaŭ multaj kvalifitaj esperantologoj, ankaŭ la iniciatinto kaj sciencaj kunlaborantoj de Nova Biologia Nomenklature, kaj tiom da aliaj homoj (eĉ *Linnaeus* siatempe) povas esti rigardataj apartenantaj al tiuj kreemaj homoj. Sed flanke de tiuj ĉi fake kompetentaj homoj ankaŭ ekzistas tiuj, kiuj facilanime eniras terenon pri kiu ili ne estas spertaj kaj kiuj per siaj iniciatoj riskas misgvidi la postan laboron; la ekzemplo de *Givry* kaj *Vérax* en 1908 estas inter la unuaj, sed certe ĝi ne estas aŭ estos la lasta.

Oni povas dividi la diversajn iniciatojn en tri kategoriojn: unue, tiuj kiuj limiĝas al la nomoj por komuna uzo, ĉefe inspirante sin je etnaj lingvoj; due, tiuj, kiuj estas fascinitaj per la sciencaj nomenklatureoj kaj deziras krei ion surbaze de tiaj sciencaĵoj; trie, tiuj, kiuj volas suriri novajn vojojn. La distingo inter la tri kategorioj ne ĉiam estas evidenta; cetere ankaŭ povas okazi ke iu persono post kelkaj jaroj transiras al alia kategorio ol la antaŭa. Sed, kiel ajn oni prijuĝus tion kion ili proponas, oni vere ofte admiras iun personon pro la originalaj ideoj, eĉ se tiuj estas neĝustaj.

Bela ekzemplo de tia inspiroriĉa persono vivas en Antverpeno kaj konigas sin per la anagrama kaŝnomo *Manuel Halvelik*. Dum pli ol kvardek jaroj li eldonis je propraj kostoj librojn pri diversaj temoj, ĉiam kun novigemaj, kaj ofte interesaj, ideoj, sed ĉiam ankaŭ makulitaj per la fakto ke ili ne estas verkitaj de fakulo. Tiel li verkis (plejparte en Esperanto) pri proponoj pri biologiaj nomenklatureoj, pri aliaj formoj aŭ skriboformoj de Esperanto (vidu: De Smet, 1987b), pri astronomio, k.a. Liaj ideoj pri biologiaj nomenklatureoj evoluis dum la jaroj, kaj li nun pli kaj pli distanciĝas de la transformado de la sciencaj nomoj al esperanto-formo por nun krei pli trafajn nomojn (sub influo de tio, kion faras Nova Biologia Nomenklature), tiel pasinte al la tria kategorio. Lia lasta verko sur tiu kampo (1995) estas redaktita en la angla (kun la celo atingi pli grandan publikon inter la sciencistoj) kaj havas la nomon "The trimeral system in biological nomenclature". Kvankam la vorto "trimeral" en tiu ĉi kombino ne estas klara (nur eksplikita en la libro mem) kaj do ne ebligas kompreni unuavide pri kio temas, iu bone redaktita faldfolio anglalingva eksplikas la terminologiajn celojn de tiu verko kaj vekas atenton.

En la unua kategorio de la divido troviĝas homoj kiuj elpensas nomojn por ke tiuj ekzistu en lingvo, kiu kredeble bezonus ilin, eĉ sendepende de la konstato ĉu aliaj jam antaŭe faris ion tian. Bela ekzemplo estas la verkoj de *Wouter Pilger* (nederlandano), unu pri plantoj (broŝuro) kaj unu pri mamuloj (vera libreto). La verkinto diras (eĉ en la titolo) ke tiuj nomoj estas nur provizoraj kaj nur por lia privata uzo (kaj por tiu de lia familio); sed li ne hezitas konigi ilin tamen per zorge

eldonita libro. Li preferas verki sola kaj deklaras abomeni komisionojn, ĉar tiuj nur diskutas senrezulte. Neeviteble tiuj (provizoraj kaj privataj) nomoj riskas iam vivi iun pli ĝeneralan uzon, sen ke pli informitaj homoj havis la okazon prijuĝi ilin, kun ĉiaj sekvoj. - Aparte de tia agado ekzistas pluraj homoj kiuj kelkfoje kreas nomojn laŭ la bezonoj; inter la multaj ni citu *André Albault*, *L. Giloteaux*, *Bernard Golden* (sed kiu tamen unue zorge konsultas la fontojn kaj ofte petas informojn), *M. Markheden*. Speciale ni trovas tiun nomkreadon en kelkaj libroj kiuj aperis en Ĉinio. Interese estas ke la nederlandano *Degenkamp* faris belajn ekzemplojn de flornomoj, avertante pri la misrezultoj se oni transigas sciencajn nomojn.

En la dua kategorio troviĝas la adaptantoj de la ekzistanta scienca nomenklature al la esperanto-formo, do, tiuj kiuj ne sekvas la konsilojn de *Wüster*, estante fascinitaj per la ekzistantaj. Inter tiuj homoj estas kelkaj, kiuj estas cititaj en la supre skribitaj alineoj, kaj kies plej konvinka korifeo estis la norvega zoologo *Step-Bowitz*, - sed ankaŭ pluraj de la Flaŭrista Rondo. Ankaŭ la supre citita *Halvelik* faris diversajn eksperimentojn sur tiu kampo. Kaj krome ekzistas por la superaj biologiaj niveloj iu propono (eble neniam publikigita) de la polo *W. Szczepanski*, uzante literkombinojn ĉe radikoj. Ni notu ke ankaŭ *Josef Kavka* (geologo, sed ankaŭ paleontologo) agis laŭ tia maniero, kaj simile la bakteriologo *A. Vaitilavicius*.

Kavka eĉ tiel fidele emas transigi la nomojn, ke li donas la ekzemplon de *Anas capensis* (specio kiu fakte vivas tra tuta Afriko) kiu nomiĝu laŭ li: "Anaso kaburba" (interese estas noti, ke 45 specioj de afrikaj mamuloj nomiĝas "capensis") . Pli amatorisme ion tian faris *R. Garcet* en sia privata paleontologia muzeo en Eben-Emael en Belgio.- En la teksto de *Bombionka* (vidu poste) oni legas referojn al la proponoj de iu *Ninot Thack*, sed mankas informoj por multon scii pri tio.

La tria kategorio estas ĉefe reprezentata per Nova Biologia Nomenklature, sistemo kiu suriras sendependajn vojojn, uzante la lingvon Esperanto por krei laŭ NBN-reguloj komplete novajn nomojn. Estas rimarkinde ke ankaŭ alia persono, Bombionka A. (Ĉefio) ellaboris (supozeble sen scii pri N.B.N.) iun sendependan sistemon, ankaŭ farante nomojn laŭ la nuntempaj scioj pri la taksonoj, kaj grandparte forĵetante la tradiciaĵojn; bedaŭrinde lia (supozeble ĝis nun ne publikigita) teksto estas iom ĥaose redaktita kaj ĝi nur malfacile lasas kompreni pri kio temas. Ankaŭ estas klasifebla en tiu ĉi kategorio la projekto de la polo *B. Brzezinsky*, kiu ellaboris sistemon de specinomoj, kiuj konsistis el tri eroj: familio - genro - specio, ĉiuj en esperanto-formo.

Certe pliaj iniciatoj en tiuj tri kategorioj ekzistas. Sed la nuna nombro jam lasas vidi, ke ne mankas ideoj, ĉefe eĉ ĉe homoj kiuj profesie ne apartenas al la koncernaj fakoj. Kiom ajn bonaj kaj respektindaj la ideoj kaj verkaĵoj de tiuj homoj estu, la terminologio devos ĉerpi prefere la plej valorajn inter ili, sen tamen per tio esprimi ke la aliaj ne ankaŭ havus iun specifan signifon.

10 Konkludo

Antaŭ preskaŭ 80 jaroj *Eugen Wüster* skribis jenajn frazojn, kiuj estis la komenciĝo de la ĉapitro "E. Pri la nomoj de bestoj kaj plantoj." en la Enkonduka parto de sia "Enciklopedia vortaro": "La esperantaj radikoj montrantaj bestojn aŭ plantojn estas okulfrape multnombraj en tiu ĉi vortaro. La kaŭzoj de tiu fenomeno postulas specialan pritrakton pri la problemoj de la biontologia terminaro esperanta." Lia speciala pritrakto de tiu temo jam indikis kelkajn kaŭzojn de tiu multnombro; kaj tiuj kazoj kondukis lin al pledo por "lingvekonomio". Plurloke li en tiu ĉapitro insistis, ke la scienca nomenklatureto ne servu kiel modelo por la nomaro en esperanto; estas bedaŭrinde ke tiu konsilo ne estas sufiĉe aŭdita kaj obeita.

En alia teksto de tiu ĉi simpozio la malkonvenaĵoj de la nuna scienca nomenklatureto estas plurfoje montritaj. Ankaŭ el tiu teksto evidentiĝas ke *Wüster* komplete pravis per sia konsilo. Tiu alia teksto eĉ aŭdacas proponi ke, konforme al la deziro de kreskanta nombro da homoj, la biologio iun tagon transsaltos al alia sistemo de nomado, ĝuste kiel gi fakte jam faris tri fojojn en la historio de la scienco. Por multaj homoj la ebleco de tia transsalto estas io kvazaŭ neimagebla, eĉ sakrilegia. Ni komprenu ke multaj homoj surbaze de tiu sinteno malakceptas la esperon pri la eblaĵoj de nomarsistemo kiu aplikas aliajn metodojn ol la nuna. Ankaŭ en kelkaj esperantlingvaj tekstoj tiu ideo de ebla transsalto estas prezentita kiel pridubebla kvankam ne malbonvena (ĉe *Neergaard*, ĉe *Cumberlidge & Sachs*, k.a.), eĉ kiel fantaziaĵo (ĉe *Støp-Bowitz*).

Sed la realo iun tagon povus esti io alia. La estonteco devos montri kio estos la solvo.

Literaturo

CUMBERLIDGE, N. & SACHS, Rüdiger - 1997 - Ĉu vi estas *Homo sapiens* aŭ *Antropo regnotipa*? - *Scienca Revuo*, 48, n-ro 1(170), pp. 9-18.

DE SMET, Wim M.A. - 1959 - La polipteroj, strangaj afrikaj fiŝoj. - *Scienca Revuo*, 11, pp. 19-27.

- 1963 - Konsideroj pri la biologia nomenklatureto. - *Scienca Revuo*, 13, pp. 117-119.

- 1970 - (Recenzo): Plena Ilustrita Vortaro: Natursciencoj. - *Heroldo de Esperanto*, n-ro 1497 (nov.), p. 3

- 1971 - La nomoj de la Cetacoj. - *Scienca Revuo*, 22, pp. 21-32, 39-48, 71-78.

- 1981 - La Nova Biologia Nomenklatureto sub la vidpunktoj de komputiloj. - *Kibernetiko de la homa lingvo. Inst. Kibernetiko, Paderborn*, pp. 170-174.

- 1987a - Kiel nomiĝu la *musquash*? - *Monato*, 1987, n-ro 6, pp. 20-21.
- 1987b - Misprezento de terminologia koncepto. - *Akademiaj studoj*, 1987, pp. 87-89.
- 1991a - La sistemo N.B.N. (Nova Biologia Nomenklatur). - *Asocio Enkonduko de N.B.N., Kalmthout (BE)*, 94 pp.
- 1991b - A Guide to New Biological Nomenclature (N.B.N.) - *Ass. Introd. N.B.N., Kalmthout (BE)*, 64 pp.
- 1995 - Nuna stato kaj perspektivoj de Nova Biologia Nomenklatur. - *La nuna stato kaj estonteco de la internacia lingvo esperanto. Kava-Pech, Prago*, pp. 139-154.
- 1998 - The necessity of a new form of nomenclature for naming the living world. - (*Hic*)

DÖHLER, Walter - 1923 - Esperanto kaj la terminologio de la biontoj. - *Intern. Scienca Revuo*, 7-9, pp. 21-28.

(GETTING, W.A. trad.) - 1961- Bild-libro pri bestoj. - *Daily Mail-Press*, 76 pp.

GIVRY kaj VERAX, Charles -1908a - Provo de botanika nomigado. - *Intern. Scienca Revuo*, 1908, pp. 58-61.

- 1908b - Provo de Esperanta nomigado por Zoologio. - *ibidem*, pp. 317-321.

HALVELIK, Manuel - 1970 - Skatolo de Pandora kaj ĉevalo de Troje. - *Scienca Revuo*, 22, pp. 97-99.

- 1996 - The trimeral system in Biological Nomenclature. A revolutionary new approach. - *Kariljono, Wilrijk (BE)*, 76 pp.

JACKSON, Judith -1995 - Bestoj en la taksonomia ĝangalo. Zoologia terminkreado. -*La nuna stato kaj estonteco de la internacia lingvo esperanto. Kava-Pech, Prago*, pp. 100-109.

KAVKA, Josef -1981 - Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantigon. - *Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko. Sc.-teĥn. sekcio Asocio Esp. Slovaka SR*, 1, pp. 6-14.

MAKKINK, G.F. - 1948 - Nomoj de kelkaj plej oftaj Nederlandaj birdoj. - *La progresanto*, 10, pp. 47-48, 54, 64, 70-71.

- 1975 - Recenzo: Støp-Bowitz C.: Enkonduko en ĝeneralan biologion. - *Esperanto*, 68, p. 12.

NEERGAARD Paul - 1963 - La lingva problemo en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj. - *Scienca Revuo*, 13, pp. 103-110.

- 1987 - Plantnomoj en la Lingvo Internacia. - *Serta gratul. J. Regulo, II, La Laguna*.

NOMENKLATURA KOMISIONO DE LA ORNITOLOGIA RONDO ESPERANTLINGVA.

- Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj. - Esperanto Press, Cardiff, Kanado., 68 pp. (KNEB)

PILGER, Wouter F. - 1992 - Provizora privata listo de nomoj de bestoj. - Mamuloj. - *Vulpo-Libro*, Lelystad (NL), 72 pp.

SACHS, Rüdiger - 1996 - Zoologia nomenklatur, medicina terminaro kaj Internacia Lingvo. - *Scienca Revuo*, 47, pp. 14-26.

STØP-BOWITZ, Carl - 1963 - Kiel nomi la organismojn? - *Scienca Revuo*, 13, pp. 110-117.

- 1971 - Zoologia nomenklatur. - *Scienca Revuo*, 22, pp. 79-90.

- 1987 - Biologiaj nomenklatur kaj ilia esperantigo. - *Serta gratul. J. Regulo*, II, La Laguna, pp. 719-730.

TERMINOGRAFIA KOMISIONO PRI BOTANIKO KAJ ZOOLOGIO - 1994 - Zoologia kaj botanika nomenklatur (Propono pri regularo). - *UEA (Rotterdam) - Terminologia Esperanto-Centro* - 15 pp.

VILBORG, Ebbe - 1989-1995 - Etimologia Vortaro de Esperanto. - A-D, E-Ĵ, K-M, N-R. - *Eldona Soc., Malmö*.

WARINGHIEN, Gaston (Red. 1970) - Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. - *SAT, Parizo*, 1299 pp.

WÜSTER, Eugen (1923) - Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana. Unua parto. - Leipzig: Hirt. (*nekompleta*)

- (kun KIRSCHKE P.) - 1927 - Zamenhofa Radikaro. - *Leipzig: Hirt*, 88 pp.

ZAMENHOF, Ludvik L. - (1925) - Fundamento de Esperanto. - *Sesa eldono*. - *Esp. Centra Librejo*, Paris, 182 pp.

Autoren

Otto Back (Laudongasse 20/1, A-1080 Wien), Dr. phil., Honorarprofessor für Graphematik und Orthographieforschung an der Universität Wien.

Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, 12683 Berlin, dblanke.gil@snafu.de), Dr.sc.phil., Lehrbeauftragter f. Interlinguistik a.d. Humboldt-Univ. Berlin, Vors. der Gesellschaft f. Interlinguistik.

Wera Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, 12683 Berlin, wera.blanke@snafu.de), Initiator des Terminologischen Zentrums von Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Sabine Fiedler (Am Zollamt 5, DE-04838 Gordemitz, sfiedler@rz.uni-leipzig.de), Dr. phil. habil., Linguistin, unterrichtet Übersetzen, englische Grammatik und Interlinguistik am Institut für Anglistik der Universität Leipzig, Stellvertr. Vorsitzende der Gesellschaft für Interlinguistik e.V.

Heinz Hoffmann (Finstere Gasse 2, DE-01445 Radebeul, IFEFF.B90GR-mei@t-online.de), Dr. Ing., Sekretär der Fachwörter-Sektion der Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Föderation.

Herbert Mayer (IEM, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 WIEN, herbert.mayer@onb.ac.at) Leiter des Internationalen Esperanto-Museums (IEM) und der Sammlung für Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek.

Karl-Hermann Simon (Carl v. Ossietzky-Str.21, 16225 Eberswalde, khsimon@fh-eberswalde.de), Dr. rer.silv., Forstwissenschaftler und Lexikograph.

Wim M.A. de Smet, (Hertendreef 12, B-2920 Kalmthout), Dr.rer.nat., Biologe.

Ingward Ullrich (Am Feldrain 11/54-20, DE-98646 Hildburghausen), Dipl.-Forstingenieur.